

XXX
JARO
1936

POLA

JUNIO
6
NUMERO

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

VII POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO EN KRAKOVO.

31. 5. — 1. 6. 1936.

Lasta Pollanda Kongreso Esp. okazis en junio 1933-a en Varsovio.

Aregoj da malhelpoj ne permesis aranĝi la VII-an en la jaro 1934. Ĝi estis jam organizata por junio 1935, sed en la lasta momento la Kongreso devis esti revokata.

Nur nun, en la jaro 1936, povis denove kunveni gesamideanoj por preparoli la aferojn de la Esp. movado en Pollando.

Denove ni veturis al la Kongreso kun sufiĉe pezaj koroj. Ĉu multaj alvenos? Ĉu la Kongreso sukcesos? Ĉu la Esperantistaro ne „malkutimiĝis“ kongresi pro kelkjara interrompo?

Tiel demandis sin certe ne nur la kongresanoj, veturantaj Krakovon, sed ankaŭ la organizantoj mem.

KAJ TAMEN ĜI OKAZIS.

Standardo Esperanta, klariga surskribo, afable atendantaj gesamideanoj — ĉio jam ĉe la stacidomo en Krakovo — estis por la alvenantaj kongresanoj klara pruvo, ke la Kongreso okazas kaj ke ĝi estas bone organizita. Jam antaŭtago de la Kongreso, la 30-an de majo, de plej frua mateno fervore deforis ĉe la stacidomo allogaj samideaninoj kaj eĉ la vigla kongresa sekretario s-ro Kutscher ankaŭ. Li bone sukcesadis forlogi monon por la kongresa kaso el la poŝoj de la kongresanoj...

Ĉiu ricevis tuj ĉe la stacidomo koverton kun siaj kongresaj dokumentoj. Kongreskarto, rubanda insigneto, urba plano, kelkaj bildpoŝtkartoj de Krakovo, karteto kun indiko de la preparita loĝejo — jen la enhavo de la koverto. Tute sufiĉa por ĉiu kongresano, por ke li povu jam ĉe alveno senti sin, kiel ĉe si hejme.

INTERKONATIGA VESPERO.

Sabate, la 30-an de majo vespere, en la restoracio „Pavillon“ okazis la kutima interkonatiga vespero. Apud longega tablo eksidis ĉiuj alvenintaj gesamideanoj, kiel ankaŭ la gastamaj krakovaj gesperantistoj. Estis tiom multaj verdsteluloj, ke ekmankis loko kaj oni devis helpe de kelnero ankoraŭ plilongigi la tablon.

Malnovaj gekonatuloj ĝoje salutis sin reciproke. Novaj konatigoj estis rapide farataj.

Multaj estis la alvenintoj de diversaj urboj. Precipe Silezio estis bone reprezentita.

Tamen ni ne vidis aron da vizaĝoj, ĉiam renkontataj dum niaj landaj kongresoj. Certe ĉiu el ili volis ĉeesti la Kongreson. Sed la vivo fariĝas ĉiam pli malfacila, krizo forrabas de multaj la laboron, la eblecon pene perlabori por ĉiutaga pano. Tial multaj fervoruloj forestis.

MALFERMO DE LA KONGRESO.

Dimanĉe, la 31. 5., post la diservo la kongresanoj plenigis la belan salonon de la Industria Muzeo, bone konatan al ĉiu. Tie ĉi ja ĉiam okazas la kunsidoj de la landaj Esp. kongresoj, tie ĉi ankaŭ kongresis la XXIII Universala Kongreso Esp. La afabla direktoro de la Muzeo, nia samideano inĝ. Tor ĉiam plezure disponigas la salonojn de la Muzeo por la Esperanta movado. Neniam li malvigliĝas, kontraŭe — kun ĉiu jaro li ĉiam pli kaj pli fervoriĝas por nia movado.

Je 10-a matene — kiam la salono jam estas plenplena — la prezidanto de P.E.D. prof. dro Odo Bujwid malfermas la Kongreson. Li salutas ĉiujn alvenintojn kaj mallonge montras la gravecon de la Kongreso en la nuna kriza tempo.

La Kongreso elektas jenan prezidantaron: prezidanto — red. J. Szapiro (Białystok), vicprezidantoj — dro Mędrkiewicz (Lublin), dir. inĝ. Tor (Kraków), ministeria konsilanto Wyszynski (Warszawa), mgr. Cz. Pruski (Lublin), ĝen. sekretario — L. Kutscher (Kraków), sekretarioj — inĝ. Chmieliński (Łódź), Kołodziej (Królewska Huta), mgr. Hodakowski (Kraków).

La prezidanto Szapiro dankas por la elekto kaj atentigas la kongresanojn pri tio, ke sekvontan jaron la Universala Kongreso okazos en Varsovio, ligita kun la 50-jara jubileo de Esperanto. Li alvokas tial la kongresanojn, ke ili serioze traktu la aferojn, memorante la respondecon, ŝarĝantan la pollandan Esperantistaron.

Komenciĝas la salutparoloj de la delegitoj. Unua parolas la prezidanto de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo ministeria konsilanto Wyszynski. Li informas interalie pri la preparoj por la XXIX-a Universala Kongreso en Varsovio kaj sciigas, ke la Ministerio de Komunikado decidis eldoni en Esperanto 12 diversajn gvidfoliojn tra polaj urboj.

Vigla aplaŭdo de la kongresanoj pravas la kontentecon de la Esperantistaro pro tiu imitinda decido.

Sinsekve parolas poste la reprezentantoj de la Esp. societoj en Łódź, Lwów, Lublin, Tarnów, Poznań, Kraków, Sosnowiec, Chorzów, Nowy Bytom, Nowa Wieś, Knurów, Hajduki Wielkie, Brzeziny Śląskie, Białystok, Szopienice, Lelów, Katowice. La urbestro de Białystok, la naskurbo de la Majstro, estas — kiel dum

ĉiuj ĝisnunaj universalaj kaj landaj kongresoj — oficiale reprezentita. Ĝia delegito estas s-ro Szapiro. El Chorzów salutas aparte reprezentantino de blindula Esp. grupo.

La sekretario legas poste salutleterojn kaj telegramojn, ricevitaĵojn de la Kongreso. Interalie salutis Brita Esp. Asocio, Franca Societo por propagando de Esperanto, prezidanto de UABO kapitano Silhan, redaktoro de „Nia Gazeto“ Grenkamp-Kornfeld.

La laboran parton de la Kongreso jam en la malferma kunsido komencas dro Mędrkiewicz per priparolado de la grava demando de „Interŝtata Lingva Traktato“. La afero estas bone konata al ĉiuj legantoj de „Pola Esperantisto“. Dro Mędrkiewicz substrekas, ke necesas klopodi ĉe la registaroj por atingi ilian konsenton je interŝtata traktato, kiu rilatu al la enkonduko de unujara Esperantokurso en la lernejoj de ĉiuj ŝtatoj. Tiu kurso estu farata al infanoj antaŭ ol ili komencas la studadon de fremdaj lingvoj.

La propono de Dro Mędrkiewicz estas vigle pridiskutata de la kongresanoj.

Dro Karol Klein (Lvovo) parolas pri privataj aranĝoj de Esperantistoj, kiuj iafoje malutilas la propagandon de nia lingvo. Li postulas, ke P. E. D. havu kontrolon kaj zorgu, ke tiaj bedaŭrindaj sekvoj estu evititaj.

Red. Lubliner (Varsovio) mencias similajn faktojn pri la Esp. eldonaĵoj. Ankaŭ tie estus necesa kontrolo de la landa Esp. organizaĵo.

La Kongreso elektas komisionon el s-roj dro Mędrkiewicz, dir. inĝ. Tor, mgr. Pruski, red. Lubliner kaj dro Klein por pristudi la tri suprajn proponojn kaj prezenti al la sekvonta laborkunsido de la Kongreso konformajn rezoluciojn.

Antaŭ la fermo de kunsido ekstaras sur la podio dro Dreher por tuŝi gravan aferon. Baldaŭ pasos 25 jaroj, depost kiam nia altŝatata prezidanto prof. dro Odo Bujwid ekkomencis sian viglan, seninterrompan agadon por nia sankta afero. Li proponas, ke la Kongreso elektu jubilean komitaton por inde honorigi la meritplenan profesoron.

Bruaj aplaŭdoj sekvas tiun proponon. Ĉiuj ekstaras kaj faras ovaciojn al prof. Bujwid, modeste sidanta inter la kongresanaro.

Prof. Bujwid dankas la kongresanaron kaj diras, ke ne estas bezona ia ajn ju-

bileo. Li faras ĉion laŭ sia eblo kaj la laboro mem estas por li sufiĉa rekompenco. Li estas kontenta povi labori por la nobla ideo de la Majstro.

Post la kunsido estis montrata kinematografata filmo pri Aŭstrujo, la lando de la nunjara Universala Kongreso.

Komuna tagmanĝo, prizorgita de la ĉiam agema s-ino Neuberg en la restoracio „Szarotka“, pasis tre agrable. Oni baldaŭ denove rapidis al la kongresejo por ĉeesti la laborkunsidon. Dum tiu Kongreso la fiksitaj en la programo horoj estis tre severe observataj.

(Daŭrigota).

SEKRETA RAPORTO PRI LA VII-a. Avizo de la redakcio.

En la sekvonta N-o de „Pola Esperantisto“ ni publikigos ne nur la daŭrigon de la kongresraporto, komencita en la nuna numero, sed ankaŭ... sekretan raporton pri la VII-a, kiu estis ien for-ekspedota.

Tiun raporton feliĉe perdis kune kun sia kapo certa malgajvizaĝa sinjoro, nomanta sin Joŝo, kiu gustumis tro da mie-
lo en la ejo „Sub la kruceto“.

Ĉu li perdis ilin ĉe ir-enoj aŭ ir-revenoj, ni ne povis konstati. Laŭdire li faris konstante movadon inter la Kongresejo kaj la „kruceto“.

La sekreta raporto, kiu ja ne estis destinita por ni, estas interesa dokumento kaj tial ni publikigos ĝin.

La kapon s-ro Joŝo ankoraŭ ne retrovis. Li plendis pro tio al la kongresa prezidanto.

NI KREU HELPARMEON!

Lastatempe la kolonoj de „P. E.“ pleniĝas per la alarmaj artikoloj de niaj eminentuloj. Ili proponas diversajn rimedojn, celantajn efikan luktadon kontraŭ la kreskanta stagno en nia movado.

Ciu serioza kunbatalanto bone komprenas, ke la afero fariĝas urĝa. Temas ja pri la savo de gravegaj rezultoj de duonjarcenta laboro de generacioj, kiuj sinofere kaj entuziasme dediĉis sin al la sankta afero de Esperanto. Tio nepre postulas energian mobilizon de ĉiuj aktivuloj, de la tuta frontarmeo de tutmonda samideanaro, precipe tamen de polaj kunbatalantoj. Per meilaj paŝoj alproksimiĝas ja la granda jubilea festo de Esperanto. Alproksimiĝas la tempo, kiam pola samideanaro kunfrontiĝos kun la tuta Esperanto-mondo, antaŭ kiu ĝi estas respondeca pri la bona kaj racia preparo de l' Universala Kongreso en la jaro 1937.

Tamen ne sufiĉas la mobilizado de ĉiuj aktivuloj, nepre necesas krei ne malpli gravan, multnombrian helparmeon. Ĝin ni varbu inter la simpatuloj de nia afero. Ciu konsentas, ke ilia amaso multoble superas tiun de aktivaj batalantoj. Oni proponas aktivigi tiujn simpatulojn per la plebiscito. Certe tiu ĉi stako je ilia pasiveco estos valora kaj ni nepre serioze ekkonsideru tiun ĉi proponon. Sed — ŝajnas al mi —, ke ne

malpli grave estus, se ni envicigus en nian tutmondan movadon kiel subtenantajn membrojn de naciaj Esperanto federacioj diversajn asociojn: ideajn, sociajn, sciencajn kaj fakajn. La statutoj de nia P. E. D. ne antaŭvidas tion, limigante la membraron je nure Esperanto-rondoj. Tion ni nepre ŝanĝu! Ni ne enfermu nin en la malvastan kadron de l' aktiva armeo! Ni kreu la gravajn rezervojn!

Ciu el ni, staranta en la aktiva vivo, havas ja influon je la rondoj neesperantistaj diversspecaj. Ni gajnu ilin por nia ideo, inklinigu la respektivajn asociojn, aliĝi P. E. D.-on kiel subtenantaj membro-organizaĵoj. Ni agu do ne nur je la individuoj per la plebiscita procedo, sed ni aktivigu ankaŭ tutajn organizaĵojn. Ju pli granda estos la listo de subtenanta membraro, ju pli eminentaj asocioj — precipe tutlandaj — konsistigos ĝin, des pli gravan moralan forton reprezentos nia movado. Kreskos ankaŭ nia influ-sfero, ebligante al ni la propagandon pri la interŝtata akordo koncerne de Esperanto. Jenaj estraranoj de aliĝontaj organizaĵoj neesperantistaj, kiuj kaŭzos ĉefe la celitan aliĝon, certe ne ekkontentiĝos per ia aliĝo mem. Ili daŭrigos sian poresperantan agadon en la vicoj de propra organizaĵo. Ili restos valoraj kondukiloj de niaj iniciatoj inter la asocia-

noj. Tiamaniere per miloj da fadenoj ni kunligos nin kun amaso da organizitaj, aktivaj civitanoj.

Malfacila estos nur la komenco ĝis la unuaj konsiderindaj organizaĵoj ekanoncos sian aliĝon. Poste la listo de membro-organizaĵoj subtenata per alvoko de P. E. D. kaj per la persona influo de varbantoj kreskiĝos pli efike la helparmeon.

Sin trudas la demando, ĉu la subtenantaj organizaĵoj aliĝu nur per la platona deklaro aŭ ili prenu ankaŭ sur sin iun devon, ricevu certajn rajtojn? Evidente — la membreco sen devoj kaj rajtoj restos senefika, (S-ro Pruski bv. rimarkil! La Red.). Ĝi estu nepre aktiva! Ĉiu organizaĵo pagu do certan eĉ plej mode-

stan jarkotizon proporcian al la nombro de sia membraro. Certa minimumo (kelkzota) kaj maksimumo (kelkdekzota) estos difininda.

La kotizo permesos al P. E. D. tiom pli abunde disvolvi la propagandon inter la membro-organizaĵoj. La kotizo rajtigu ilin partopreni en niaj kongresoj pere de delegitaro kun konsila voĉo.

Mi skizis nur la principojn, detale kaj konkrete ili estu preparolataj en P.E.D.

El la modesta golfeto de nia kara Esperantujo ni eliru sur la plenan maron de l' ŝaŭmanta vivo por gajni finfine la mondon por nia benon promesanta, eterna ideo!

J. Silhan.

KRYNICA — LA PLEJ ĈARMA KAJ FONTRIĈA KURACLOKO EN POLUJO.

Inter multaj polaj kuraclokoj, kiuj allogas ankaŭ eksterlandanojn, la plej gravan postenon okupas la vere fama kuracejo — KRYNICA. Situita en vojevoĉejo Kraków, ĉe la piedoj de ĉarmaj Karpatoj, 560 m super la marnivelo, en la pentrindaj valoj de la riveretoj Kryniczanka kaj Palenica, ŝirmita norde per montaro, kun deklivo malfermita al sudo, prezentas Krynica unuarangan banlokon, dank' al siaj mineralaj fontoj, komforte kaj lukse aranĝitaj banejoj kun sal-, marc- kaj gasbanoj. Speciale bongusta estas la akvo gasa acidkarbona.

Krynica ŝuldas famon ne nur pro eksterordinare ĉarma ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ pro siaj grandegaj naturriĉaĵoj. Ĉirkaŭata de arbaroj kaj kamparoj ĝi naĝas some-re en verdaĵo kaj vintre ĝi kovriĝas dum 4 monatoj per blanka neĝmantelo, brilanta en la montaraj sunradioj. Dank' al nekutime favoraj teren- kaj klimatkir- konstancoj ĝi fariĝis unu el la plej valoraj perloj de polaj kuraclokoj, kaj vintre unu el pli gravaj centroj de vintraj sportoj. La ĉiujare aranĝataj internaciaj sportkonkursoj amasiĝas milojn da gesportuloj ankaŭ el malproksima eksterlando.

En lastaj jaroj Krynica ege disvolviĝis dank' al speciala zorgo de pola ŝtato, kiu la tutan monprofiton destinas por konstruado de novaj modernaj kuracdomoj laŭ okcidenteŭropaj modeloj, por plibonigoj de kurac- kaj bane-aranĝoj. Tio

ĉi kaŭzas, ke la eksterlando ĉiam pli interesiĝas pri ĉi tiu ŝtata fontkuracejo kaj vizitas ĝin multnombre. Krynica estas preskaŭ la sola en Eŭropo kuracloko, funkcianta dum la tuta jaro (krom monato aprilo).

Vere malmulte estas en la mondo da fontkuracejoj, kiuj posedus tiel grandan nombron da malegalaj mineralfontoj, destinitaj por diversaj malsanoj. En Krynica elŝprucas samtempe la akvoj je samaj mineralelementoj kiel la famaj fontoj de franca Vichy, Royal kaj de belga Spa. Ĝiaj akvoj estas samvaloraj kiel tiuj en Neuenahr, Pyrmont, Wildungen, Franzensbad kaj parte ankaŭ Karlsbad.

Krom riĉaj fontoj, enhavantaj la forte alkalian kaj ferteran akvon, kiu servas egale por trinkado kiel ankaŭ por bano, estas tie kuracaj torfejoj (marĉbanejoj). Bonege efikas la akvoj en multaj malsanoj: anemio, reŭmatismo, virinaj — kaj kormalsanetoj, kronikaj stomakaj malsaniĝoj, intestoj, hepato kaj malsanoj (podagro, diabeto, dikkorpeco), nerva elĉerpiĝo. Ĉirkaŭ 60 eminentaj kuracistoj sanigas el diversaj landpartoj kaj landoj homojn, kiuj serĉas tie helpon kaj savon en diversaj siaj doloroj. Kontraŭindiko: tre disvolvigitaj kormalsanoj, tuberkulozo kaj arteriosklerozo.

Krom someraj kaj vintraj sezonoj, kiuj konkuras rilate al ĉarmo de la panoramo, estas ankaŭ tre bela aŭtuno kaj sunriĉa printempo. Ĉi tiuj sezonoj estas la

plej malmultekostaj kaj tre ŝatataj de pli gravaj malsanuloj, kiuj preferas la trankvilon.

La senĉesa disvolviĝado de ĉi tiu kuracloko estas merito de nuna estraro, kies racia kaj intensiva mastrumado kreis en Krynica efektive eŭropan kuracejon. La

direkcio de la fontkuracejo kuŝas en la manoj de la inĝeniero s-ro LEONO NOWOTARSKI, kiu apartenas al la plej spertaj gvidantoj.

Prof. Sygnarski

prezidanto de Scienca Esp. Rondo
en Bydgoszcz — Polujo.

PROPAGANDU ESPERANTONI!

(Grava peto al ĉiuj esperantistoj)

Rilate al la artikolo de prof. SYGNARSKI en nuna numero (Krynica — la plej ĉarma kaj fontriĉa kuracloko en Polujo), ni petas insiste esperantistojn de ĉiuj landoj, ke ili multnombre skribu al Direkcio de kuracloko sub jena adreso: S-ro Ing. LEONO NOWOTARSKI, direktoro de ŝtata fontkuracejo — Krynica, Polujo, petante pri detalaj informoj en esperanta lingvo koncerne la prezojn kaj vivtenadon en tiea kuracejo. Vidante, ke multaj esperantistoj interesiĝas pri Krynica, la direkcio certe eldonos la bele

ilustritan faldprospekton en nia lingvo kaj dissendos ĝin al ĉiuj demandintoj. Tiamaniere ĉiu povos tre efike propagandi Esperanton. Nia lingvo devas venki ne nur pere de lernejoj, sed ankaŭ aplikate de diversaj laborkampoj. Dum somersezone la estraro aranĝos tie la esperantan kurson laŭ Cseh-metodo. Helpu do al ni! Skribu multnombre!

Kun antaŭdanko por tre grava servo
SCIENCA ESPERANTA RONDO
Bydgoszcz — Polujo
pl. Wolności 9.

EUGENJUSZ MATWIEJCZUK.

Al dubantoj...

Sur vojoj mirindaj de l' sort' kaj destin'
mi fortojn batala'n kolektas,
kaj nun al dubantoj, plendantaj sen fin',
mi vokon ĉi tiun direktas:
ho, semu vi semojn de kred' kaj fervor'
kaj iĝu komenco de l' ag' kaj labor'.

En monstra teruro, mordanta min tre,
kun koron-pikanta sufero,
mi vidas, ke anoj de sankta ide',
komence en flama espero,
celantaj senlace al Granda la Cel,
jam perdas la firmon de sia fidel'.

Kaj... vel en la koro, animo, spirit'...
de hom', kiu AGI intencis,
malica satano de dub' kaj hezit'
damnindan laboron komencis,
kaj falas la kredoj, espero, agvol'...
kaj restas nur dubo kaj... plenda parol'.

Komencas malkredi. jam nia anar'
je veno de l' grava momento,
dum forte eksonos al tuta homar',
belkanto de Nova la Sento,
ho, falis jam kredoj je veno de temp',
de temp' de eterna, homara printemp'.

Al tiuj dubantoj, plendantaj sen kred',
al homoj de l' eta animo,
al anoj de l' dubo, hezito kaj ted',
ho, kies nur ĉiu esprimo
gravedas je dubo, malkredo nesci'...
ĉi tiun konsilon ekdonas nur mi.

Ho, ĉesu ĉam, fratoj, dubadi sen senc',
vankrii, malkredi kaj plendi,
kaj ĉesu senfine kun malpacienca
je mort' de l' Afero atendi,
ĉar vere neniu minacas nun ĝin,
ĝi estas eterna kaj vivos sen fin'.

Forlasu jam viajn „konsilojn“ sen grav',
naskatajn de vi ĉiutage,
kaj ĉiajn proponojn por la idesav',
komencu ne dire, sed age,
memoru, ke vere maleblas pere'
de granda de l' Majstro „Interna Ide“.

Kaj dum ni laboros en kred' kaj esper',
kaj dubon forfetos el koro,
nur tiam ni Bonon venigos al ter',
kaj Celon atingos en gloro;
nur tiam forpasos, maljust', krim' kaj fi'
kaj venkos la Vero kun helpo de Di'!

SKOLTA ANGULO.

ATENTU!

Geskoltoj, kiuj deziras partopreni SEL-kunvenon dum la Univ. Kongreso de Esp. en Vieno (8—15. VIII.) kaj polaj geskoltoj ĉeestontoj de la Tutpollanda Kongreso en Kraków (nunjare) interrilatiĝu kun s-ro Emil Mayer, Kraków, Lelewe-la 9.

POLA AGENTEJO TELEGRAFA PRI SEL. TENDARO.

En aprila bulteno de Pola Agentejo Telegrafa oni anoncis pri la okazonta Internacia Tendaro de SEL en Ipswich (Anglujo).

NI GRATULAS.

Al la skoltrevuoj, kiuj aperigas esp. rubrikojn, apartenas nia bonekonata pola dusemajngazeto „Skaut“ (Lwów, Kurkowa 12), kiu jam delonge presas tiun kolonon. Lasta nro 16. dediĉita al memoro de Sankta Georgo (patrono de la Skoltaro) enhavas artikolojn en diversaj lingvoj inter aliaj troviĝas paĝo en esperanto. Interesitoj postulu la gazeton de „Skaut“ Administracio. La Redakcio de ĉi tiu skoltrevuo invitas ĉiujn pri alsendado de bonaj novaĵoj el la skolta esp. movado.

KANTO.

Homo estas kreaĵo ariĝema — socie-tema — kaj kiel birdo — ŝatas kanti. Ŝatas esprimi sian doloron, sian ĝojon, siajn pensojn, sian amon — laŭte kaj brue — en bela muzikado, en potenco, sentema aŭ ĝaja melodio.

Kanto — eterna, kanto, kiu naskiĝis super la lulilo de la homa kulturo kaj civilizo, ĉi kanto daŭras — kaj daŭros ĉiam; daŭros tiom longe, kiom longe daŭros homo pensema, kiu amas, admiras kaj sinoferas, kiom longe daŭros ĝojo kaj malĝojo — mizero kaj doloro.

Eterna homa kanto... ensorĉanta, parolo de la homa koro, homa animo, homa spirito. Parolo de poezio — vortoj de la plej noblaj homaj kvalitoj...

Ĉu vi ne pli diligente, ne pli volonte laboras — ĉe la vortoj kaj melodio de vigla, fervorplena kanto? Ĉu malĝojo, kaj malespero ne foriĝas, ne malaperas sub la ĉarma, sorĉa ektuŝo de la kantaj vortoj?

Anoj de la ĉiam-migranta skolta popolo — ankaŭ estas kantemaj. Ili ne preterlasas ian-ajn okazajon, sen kanto, tiu ĉi ĝajigilo, kunigilo kaj... edukilo. Ili kantas ĉiam dum la laboro, dum ĉiu okupo kaj ludo, dum marŝo kaj migrado, dum ripozo kaj manĝo — eĉ dum la dormo...

Kaj tio ĉi estas kaŭzo, ke tiom multe da kantoj enhavas skolta kantarono. Kaj tio ĉi estas kaŭzo, ke mi — volante plifaciligi vivon al verdaj skoltoj en Esperantujo (sen kantoj skoltoj ja ne povas vivi — kiel fiŝo sen akvo) — mi provis elpoligi kelkajn el ili — almenaŭ la plej konatajn — laŭpove, tradukante kiom eble — laŭvorte.

Jen kelkaj el ili. Du estis en lasta

„skolta angulo“ — pluaj sekvos.
Do — kantu ni!

Gaje -- vigle — forte!
En vagono...

(Z Port-Artura jedzie fura...)

En vagono Pataŝono

Vojaĝas -- sed sen plafono —

Kaj trinketas ĉajon, ĉajon,
Ĉokoladon — marmeladon —
Kaj trinketas ĉajon, ĉajon,
Ĉokoladon — kaj kakaon!

Patro mortis — restis filo

Kaj heredis nur fumilon!

Kaj trinketas k. t. p.

Patro mortis — jam tombumas

Kaj filo nur pipon fumas —

Kaj trinketas k. t. p.

Humorplene — mokeme!

Al bovidej' venis bovido...

(Do stajni wlaźło ciełę tłuście)

1.

Al bovidej' venis bovido --

Al la porkejo — porkoj tri,

Inter brasikon la kaprido —

Al mia koro — venis vi!

Ho, vi fraŭlino —

Estu edzino...

Mi vin sen fino

Amas fraŭlino.

Kaj amatino —

Laŭ la destino

Falis sen timo

En brako-limon.

2.

Ĉevalid' saltas — la junulo

Ranoj — pro tim' de cikoni'

Sur la lit-tukon — nigra pulo —
En mia koro — saltas vi.
Ho, vi fraŭlino... k. t. p.

3.

Sur hoko — ĉapo de judino,
Ĉe hundkaptistoj — hurdoj tri
Sur kol' de avo — la avino,
En mia koro — pendas vi.
Ho, vi fraŭlino... k. t. p.

Aŭ agorde — impresplena...

Brulas fajro...

(Płonie ognisko...)

1.

Brulas fajro — kaj muĝas praarbaro
Frat' skoltestro — inter ni —
Rakontadas pri forpasintaj jaroj —

Reviviĝas histori'...

Pri bataloj pro la Limo-lando,
Pri herooj — de Patruj'-Pollando,
Kaj supre, alte, dolĉa flustras vento,
Kaj arbara nokt-ari'...

2.

Jam trumpet-sono vokas al reveno
Alarmsignoj fluas for —
Fratar' feliĉa kuras al posteno
Harmonie batas kor'...

Junaj vangoj flamas de fervoro
Amoplene batas ĉiu koro —
Kaj fortoplana kanto eksonoras —
Plej potenca kant' de glori'...

Józef Toczyski

1936 r.

Lwów.

INFANKURSOJ.

Nia angla samideano s-ro Douglas Boatman antaŭ nelonge en „Heroldo de Esperanto” atentigis pri tio, ke la Esperantistaro tro malmulte okupas sin pri Esperanto-kursoj por infanoj. En tio li tre pravus, ĉar ĝuste per la infanoj ni certigas al ni pretan avangardon por la venontaj jaroj. Kaj krome, infanoj, feliĉe, ne, kiel la plenaĝuloj, havas centojn da antaŭjuĝoj kaj tuj komprenas kiel necesa nia neŭtrala lingvo estas ankaŭ por ili, kaj ke ili mem per ĝi tre baldaŭ povos havi grandan utilon. Ili tre rapide povas lerni nian lingvon, ĉar — ili estas al kutimiĝintaj al lernado, kaj iliaj freŝaj cerboj ensuĉas rapide la relative facilajn regulojn.

Multaj fervoraj ĝeinstruistoj entuziasmigis „siajn” infanojn kaj ŝatus komenci Esp-instruadon, sed pro manko de lerniloj speciale taŭgaj por infanoj (tiajn la plej multaj landoj ne posedas) oni ne povis efektiviĝi sian deziron. La Cseh-metodo estas aplikata kaj -ita de kelkaj, sed multaj punktoj en ĝi ne tre taŭgas por infanoj. (mi citu nur la plej ŝatatan vorton en ĝi „ami”), ĝuste ĉar ĝi celas la menson de la plenaĝuloj. S-ro Cseh ja verkis sian metodon kun enhavo nur por tiuj, kaj ne por infanoj.

La konata Cseh-instruistino kaj eminenta pedagogo f-ino M. Saxl (Berlino) dum la lastaj jaroj ofte okupis sin pri tiu grava problemo kaj instruis Esperanton en treege multaj infankursoj. Interkonsente kun s-ro Cseh ŝi kreis nun la specialan Cseh-kurson por infanoj. Ĝi estas ĉiurilate adaptita al la infana men-

so. Ŝiaj ege sukcesplenaj infankursoj en Nederlando antaŭ nelonge pruvas, ke ŝi fine trovis la ĝustan vojon al la infanoj.

En la venonta somero ŝi gvidos en Helsingor i. a. preparan kurson por Cseh-metodaj instruistoj (26. julio — 5 aŭg. en La Internacia Atlernejo, Helsingor, Danlando. Prospektoj haveblaj ĉe Dana Esp-Instituto, Tyrasvej 15, Aabyhöj, Danl.) kaj dediĉos parton de tiu kurso al preparo de instruistoj, kiuj volas gvidi infankursojn laŭ adaptita Cseh-metodo. La temoj de tiu parto estas jenaj 1) Aranĝado de infankursoj, 2) Aplikado de la metodo, 3) Praktikaj provekzemploj, 4) Psikologiaj konsiloj al instruistoj, 5) Raporto pri sperto, 6) Diversaĵoj.

Mi deziras atentigi ĉiujn ĝeinstruistojn pri tiuj kursoj, ĉar estas tre grave, ke kiel eble multaj infanoj lernu nian lingvon, kaj ke la instruistoj por tio havu la plej taŭgan metodon. Mi esperas, ke multaj diverslandaj instruistoj kaj samideanoj venu al Helsingor, Danlando, por konantiĝi kun la sukcesplena Cseh-metodo por plenaĝuloj kaj por infanoj, kaj samtempe ĝui malmultekostan ferion en tiu belega regiono apud la maro kune kun multaj diversnaciaj samideanoj.

L. Friis, instruisto,
Aabyhöj, Danl.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

LA ĜUSTA MANIERO LEGI LIBRON.

De Prof. Walter Murdoch, Melbourne, Aŭstralio*)

En mia lito, antaŭ kelke da noktoj, ne povante dormi, mi provis unu post alia miajn kutimajn konscion-forigilojn — t. e., mi zumzumis poezipecojn, ellaboris la parencecon de Reĝino Viktorino kun Vilhelmo la Konkeranto, kompilis liston de roluloj de „Vanity Fair“, kaj faris simile lulajn menslacigojn. Post ia tempo mi sentis min dolĉe nebalkapa kaj nepre estus dormiĝinta, se mi ne, por finsukcesigi la aferon, komencus serĉi la nomojn de la edzinoj de Henriko Oka. Estis seso da ili, sed nur kvin mi povis rememori. Post kelka frapetado sur la pordojn de la memoro, mi estis denove plenveka, pensklara.

Estis Katerino de Aragono, kompreneble; ŝi pri kies eksedziniĝo la historiistoj jam tiom tamtamadis. Ŝi, almenaŭ, estas neforgesebla. Estis Anne Boleyn, nomspeco, kia neforigebla saĝas en la memoron jam de la lernubtagoj; krome, ŝi patrinis Reĝinon Elisabeto. Estis tiu alia Anne — de Cleves — por kiu ŝia agrabla edzo inventis la kromnomon „la Flandra ĉevalino“ — jen tragika sorto, ke la mondo memoras virinon nur pro ŝia nebelo. Estis Katerino Howard. Mi memoras ŝin, sed nenion pri ŝi, ekster tio, ke kapo tranĉite falis pro kaŝzoj, kiujn nia instruisto ne pensis bona, klarigi al ni; verŝajne kuŝis io nedeca en la rakonto. Estis Katerino Parr, memorinda pro rimarkomerta faro vivi pli longe ol la reĝo — ne facila tasko. Tri Katerinoj kaj du Annoj faras kvin — kiu la sesa? Mi ne povos dormi, tion mi sciis, ĝis la demando ricevos respondon. Tial, torturinte la cerbon ankoraŭ iom da tempo, mi kolere saltis el lito, por meti finon al la afero, sed trovis ĉagrene, ke mia historilibro ne enhavis la nomojn de la famaj edzinoj. Finfine mi kaptis la sinjorinon en enciklopedio; Jane Seymour! Estis nenio notinda pri ŝi krom tio, ke ŝia edzo ŝajne iom ametis sin ĝis tio, ke ŝia kapo restis surŝultre.

Mi do reengrampus la litojn, kaj pripensis la strangecon de la homa menso. Kial mi devis sendormadi, iritate kaj kolera, nur ĉar mi ne povis langi la nomon de

iu tute sensignifa virino? Kiom koncerne min Jane Seymour, kaj mi ŝin? Kial mi devis riproĉvipi min pro nekapablo nomdiri ĉiun edzinon de certa naŭza monarĥo? La afero efektive montris, kiom malmulte ni — aŭ almenaŭ mi — posedas la filozofian menson. Mi kredas, ke la plimulto da homoj statas same. Ĉu vi ne, legantoj de ĉi vortoj, ofte trovas vin plagaĉataj pro fakto, vorto aŭ nomo de vi ne re-alvokigebla?

„Atendu iometon, mi havas ĝin sur langopinto“. Sed ĝi obstine rifuzas flusi en la zonon de voĉeblogo. Ĝi obsedas la antaŭĉambrojn de la menso eble dum tagoj, ĝis ĉesigas viaj pensoj eltiri ĝin; tiam, unu tagon, ĝi saltas en la lumon. Ĉe tio vi rekonas ĝin negrava, senvalora, tute ne rememorinda.

Oni diras, ke, dum ni plimaljuniĝas, ni plifilozofiiemiĝas. Mi esperas tion vera, sed ne vidas signojn subtenantajn la teorion. Kiam profundaĝa, mi jam havu sufiĉe da prudento, ne plu min torturadi pro memormanko. Ĉar vere, se vi konsideras la demandon, estas nenio riproĉinda en tio, ke vi forgesas la nomojn de l' edzinoj Henriko-Okaj. Kio devus ĝeni vin estas tio, ke vi iam tiel malsaĝe agis, ŝarginte la cerbon per tiom da senutilaj aferoj. Se ne estus ago malfilozofia, „ploraĉi pro perdverŝita lakto“, mi inklirus kolerkrii pro la amasego da tute senprofitaj sciaĵoj, kiujn, en la kurtempo de mia vivo, mi penpene akiradis.

Mi apartenas al generacio, kiu instreje (?La Red.) lernis grandan nombron da vantaj aferoj. La tiutempaj pedagogoj — mi esperas, ke la nova edukado ŝanĝis ĉi tion — ŝajnis esti sin dediĉintaj igi la cerbojn de lernantoj sakoj plenpakitaj per ĉiaspeca maso da informaj-ĉifonoj.

Ŝajne estis eĉ pli malbone ĉe generacioj antaŭaj je mia; ekzemple la fama lernknabo de Macaulay („ĉiu lernknabo scias: kiu enkarcerigis Montezumon, kaj kiu strangolis Atahualpon“). Tiu erudicia lerneano estas por ni ĉiamverda ŝerĉo, sed ĉu efektive mia lerngeneracio rajtas lin priridi?

Ververe, ni sciis nenion pri Montezumo aŭ Atahualpo, sed tiu nescio simple signifis, ke nia instruo iris en alia direkto; ni akiradis aliajn faktojn. Ĉu ili pli valoris ol tiuj pri Montezumo kaj Atahualpo estas diskuteble; mi ne volas

*) Prof. O. Murdoch estas prelegisto pri la angla literaturo en la Univ. de Okc. Aŭstralio. Unu el la plej konataj verkistoj humuraj literaturaj en nia lando. Stilo kaj temo malpezaj, facilaj.

dogmemi pri tio. Sed por veni finon, ni, kiuj nun jam pasis la florojn de l' juno, ja scias, ke nia cerbo estas plenpakita per konoj, el kiuj naŭ dekonoj estas nenio ol rubaĵo; ne gravas ĉu ni tenu ĝin aŭ ne. Ni ne plendus, se tiuj senutilaĵoj estus flugintaj senpetite en nian menson, kiel vespertoj en belfridon; sed ili ne. Dolore ni devis akiradi ilin, je multa kosto tempa-labora, de nia flanko kaj de niaj instruistoj, kiuj fariĝis krizaj kaj ostecaj pro la streĉo ilin marteladi en niaj kraniojn.

Jen kie, laŭ mi, nia moderna edukado efektive multe malsuperas la edukon de niaj praaĵoj kaj de hodiaŭaj primitivuloj. La gefiloj de angla kamparano antaŭ 200 jaroj ne ricevis edukon bonan laŭ nia valoro-mezurilo, sed li ricevis de siaj gepatroj almenaŭ la konojn necesajn por la vivo. La junviroj de ruĝhaŭtulaj triboj lernis ĝuste tion necesan por ili; ili fariĝis mirakle lertaj en la propraj artoj, per kiuj ili devis vivi. Nia menso ne plenpakiĝis per diversaj kono-stumpoj; ĉio lernita rekte rilatis ilian vivmedion. Multe pli ol duono de nia lernakiro havas nenian rilaton al nia vivo. Kiauze valoris al mi la nomo Jane Seymour?

Sed rimarku: mi ne volas doni al vorto „uzo“ ian malvastan, utilisman signifon. Mi ne volas diri, ke tiu poezio, kiun mi povis ripeti al mi antaŭ kelke da noktoj, estas, en ajna senco, senutila. Male, mi sopiras scii pli pli da ĝi. Mia vivo estas pli riĉa pro miaj poeziaj parkeraĵoj; ĝi estus ankoraŭ pli riĉa, se mi povus kanteti al mi dum longaj nokthoroj la tutan Adelaida; kaj multe pli riĉa, se mi povus image revenigi la precizan aspekton de la tomboj en la kapelo de San Lorenzo, kaj se mi povus rememori paŝon post paŝo la argumenton de Sokrato en la Phaedo. Nomo ne malŝparas tempon-laboron, farante, ke tiaj estu liaj posedaĵoj. Ili estas trezoroj porĉiame. Sed mi ne povas rigardi la nomojn de la edzinoj Henriko-Okaj kiel porĉiaman trezoron.

Iuj diros, ke tio estas groteska troigo, kaj ke fakte oni hodiaŭ tute ne instruas en historio laŭ tiuj linioj; la feliciaj buboj de ĉi-epoko ne havas devon scii la nomojn de la supraj edzinoj. Estu tiel! Mi ne plu mencios tiujn malbonsortajn sinjorinojn; mi nur uzis ilin por ekzemplo, kaj se tiu ekzemplo estas jam ne moderna, vi povas facile pensi pri alia. Vere, ke en la nuntagaj lernejoj kaj universitatoj oni ankoraŭ devas bati en

merop treegan nombron da faktoj, el kiuj la lernintoj neniam ricevos utilon ekster tio, ke ili eble povos helpi al ili sukcesi ĉe la ekzamenoj. Komforta penso: ke post la ekzamenoj tuj falos en forgeson la granda parto da tia konakiro.

Mi ne per tio sarkasmas kontraŭ niaj lernejoj kaj universitatoj. Mi priparolas pli ĝuste la edukon, kiun oni donas al si private: kio ĝi estas, kaj kio ĝi devus esti. Mi jetas rigardon ĉirkaŭ la bretoj en la ĉambro en kiu mi sidas, kaj demandas: kiom da enhavo de tiuj libroj ankoraŭ restas miakape, kaj kiom da tempo dediĉita al ilia legado montriĝas simpla malŝparo?

Eksidante por legi libron, mi nun prepare demandas al mi: Kiom mi scias pri la temo? Kiom mi volas plu scii pri ĝi? Kiajn demandojn mi volas, ke la aŭtoro respondu? Se post konsidero mi trovas, ke mi neniel volas pridemandi la aŭtoron, mi konstatas la libron ne por mi, kaj do ne legas ĝin. (Sed tio tre malofte okazas; vi preskaŭ ĉiam trovas, post iometo pripenso, ke ankaŭ por vi staras demandoj vokantaj respondojn). Foje mi eĉ notas demandojn sur papecon, tiam eklegas la libron, ĉiam tenante la demandojn en penso, kaj serĉante la konformajn respondojn. Traleginte la verkon, mi ne ekiras rekte al nova, sed pripensas la ĵus finitan; mi cerbumas miajn demandojn kaj precize trovas, kiom la aŭtoro respondis ilin. Ĉion ceteran en la libro mi rigardas kiel neaplikeblan kaj do forigas el memoro. Tiuplane mi stampas sur mian menson, pli-malpli neforviŝeble, ion gajnitan el la verko. Tiu io povas esti nur tre eta, sed ĝi estas efektiva aĵo; la legado ne tute vanis.

Ekzemple, vi prenas libron pri komunismo. Ĝis nun vi uzis la vorton kiel simplan insulton. Vi nun ektrovas, ke post ĉio vi volas demandi pri la temo — jen: Kion precize signifas komunismo? Kiaj estas ĝiaj bonaj flankoj? Kiaj ĝiaj mankoj? Ĉu popolo iam ĝin praktikis? se jes, kun kiaj rezultoj? Ĉu al mi plaĉus vivi sub tia reĝimo? Ĉu ekzistas io lerninda pere de la komunisto, eĉ malgraŭ, ke mi malamas lian teorion rigardatan entutate?

Koncentru vian penson sur tiajn demandojn, legante. Kaj same pri aliaj libroj. Mi ne scias, ĉu la plano bone servus al ĉiuj, sed al mi ĝi iĝas la legadon malpli fremda kaj senpova, kaj (kiom ankoraŭ ĝi gravas) multe pli ĝua, interesa. Mi sentas min efektive profitanta.

Ĉi plano estas aplikebla nur al unu parto de legado; ne, ekzemple, al romanoj aŭ poemoj aŭ teatropecoj sed nur al tiu, nomita de De Quincey „la literaturo de la scio“. Sed eĉ sub tiuj limoj vi povus malkonsenti kun mi, dirante, ke en tia plano sidas io snobeca; ke en ĝi odoraĉas tiu naŭza afero, kiu iam havis nomon „memkulturo“.

Vi asertas, ke tiu rutina sistemeco for-

rabus de la legado ĝian senrespondecon, ĝian malpezecon de animo, kaj ĉarmon de papilia senceleco. Se vi trovas, ke vere mia plano t'el efikas, lasu ĝin for; ĝi por vi ja ne taŭgas. Tamen laŭ mia sperto ĝi ne forprenas la plezuron — ho, tute ne! Ĉiuokaze — ekprovu ĝin por vi mem.

Trad. el la angla: R. Banham.

PENSOJ DE LAFCADIO HEARN.

Povas efektive legi libron neniu homo, kiu ne povas esprimi originalan opinion pri ĝia enhavo.

Ekzistas nenia libro tute ne bono-hava; la bono en libro dependas por sia influo multe multe pli de la kutimoj de la leganto, ol de la arto de la verkinto, ne grave, kiom grandfama estu tiu verkinto.

Nenio estas pli malfacila en ĉi tiu mondo, ol legi libron kaj poste esprimi klare kaj vere en kelkaj linioj tutprecize tion, kio estas ĝia literatura valoro. En la mondo ekzistas ne pli ol dudek homoj povanta tion; ĉar ne nur la

kapablon, sed ankaŭ la sperton la taksanto devas posedi en ekstreme granda grado.

Nenia metrika tradukaĵo povas reprodukti la grekajn versojn — ni havas nur 20—30 liniojn de Homero tradukitajn de Tennyson, kaj kelke da linioj el aliaj grekaj poetoj tradukitaj de egale kompetantaj homoj, pri kiuj ni povas diri, ke ili estas sufiĉe kontentigaj.

Ĉiom de la granda literaturo havis s'an radikon en la riĉa humo de l' animdoloro.

(El „Vivo kaj Literaturo“, trad. R. Banham).

LA LASTAJ TAGOJ DE CARISMO EN SUDRUSLANDO.

de Letta Rudnicka Jaroszyńska

Estis en urbo Winnica en gubernio Podolio, en februaro 1917.

La ziemstvo - kunsidoj komeciĝis, kaj la granda marmora salono en la urbdomo estis plenstopita je oficistoj, bienuloj kaj vilaĝanoj, kiuj kolektiĝis ĉujare de tiam, kiam ziemstvo kaj dumo organiziĝis en Ruslando post la malsukcesinta milito kontraŭ Japanujo. Estis ĉiam la sama kolektiĝo el diversaj klasoj, ĉe kiu la marŝalo de la nobelaro funkciis kiel prezidanto. En la interna Rusujo tiu marŝalo estis elektita el la pli alta nobelaro de la gubernio; en la sudruslandaj provincoj, kie la altnobelaro konsistis el polaj bienuloj, la registaro ĉiam elektis unu el la nove envenintaj rusoj. Tiuj ja uzis la trovitajn okazojn por fari gajnigajn aĉetojn kaj instalis sin en malnovaj kasteloj kaj bienoj, kie ili vivis principe en senlima lukso. — Dum kvindek jaroj neniu Polo povis aĉeti eĉ plej malgrandan pecon da grundo.

Tie ĉi en Winnica grafo Dmitri Hejden estis elektita kiel marŝalo de la nobelaro. Li estis ŝatata pro sia tolere-ma kaj paca humoro. Multon li heredis el la grandanimeco de la patro, tiu ĉefguberniestro de Finnlando, kiu petis ek-

signon, kiam imperiestro Aleksandro la 3-a ordonis, ke Finnlando estu rusigota. La ĉefguberniestro laŭ diro estis aldoninta en sia eksigpeto: „Se vi volas rusigi Finnlandon, vi devas komenci per fermado de ĝaj lernejoj kaj detruado de ĝia malnova sveda kulturo“. — Lia posteulo estis ja la rusa generalo Bobrikoff, kaj la senco de tio ne bezonas esti dirata tie ĉi. Ĝi povas esti ĝenerale konata.

Karakteriza tipo estis la rusa oficisto, „animo“ aparta, tre bone priskribita de Gogol kaj de Turgenjev en „Mortaj animoj“ kaj aliaj pli malnovaj rakontoj pri la epoko. Enpremita en la bluverda redingotuniformo kun kirasa kolumo kaj du vicoj da uniformbutonoj, iom, kaj multokaze eĉ tre alkoholdetruita, kun ruzaj, serĉantaj okuloj, kiuj konstante serĉis politikajn krimulojn — politika krimulo estis ja kiu ajn, kiu ne pensis laŭ la ordonoj de la sankta cara registaro — tia estis la tipa rusa oficisto, kiu, de inkluzive la guberniestro ĝis inkluzive la vilaĝestro, emis havigi al si la plugajnon, avanson aŭ mondonacon, akirebla per eltrovo kaj denunco pri kontraŭre-

ĝistara opinio en penso, vorto aŭ faro. La parfumita poŝtuko kaj la diamantor-namita fingroringo ankaŭ konstante distingis la pli altrangan rusan oficiston. Kompreneble estas, ke la barbiro devis tondi lin kiel eble plej laŭ la modelo de la imperiestro.

Plue la salono estis plenigita kaj de malgrandbienuloj kaj de la malgrandburĝoj de la urbo, kaj — inter ili — de la riĉaj vilaĝanoj en siaj ŝafpeltoj kaj kun ronde tonditaj haroj. Ke malpli delikata ledodoro, miksitaj kun tabaknuboj, levigis al la plafono, ne bezonas esti menciata.

La izraelida parto de la loĝantaro estis ankoraŭ tiam malmulte reprezentata ĉe la oficialaj kunsidoj. La judoj troviĝis ja ekster la socio ankoraŭ pli ol la poloj en la cara Ruslando.

Du kuriozaj personaĵoj devas ne esti forgesitaj. Estis la rusa popollerneja instruisto kaj la pastro, ambaŭ oficistoj. La unua ordinare estis lupro en ŝafelo, „revolté“, nihilisto kun principo „unue malkonstruu, kaj poste oni trovos kiel progresos“. Lia oficiala devo estis instrui al 25% el la vilaĝanaj infanoj silabodon de frazoj en la rusa hieroglifstilo. Legi gazeton, komprenante punktojn kaj aliajn apartigajn signojn, ili ne kapablis.

Dum la milittempo oni ofte aŭdis vilaĝanojn, kiam ili en fervoja stacio laŭlegis gazeton kun sciigoj pri la milito; sed konjekti la enhavon laŭ tiu laŭlegado estis tre malfacile. Estis nur nombro da vortoj balbute silabitaj sen nuancoj en la voĉo, sen ekhaltoj ĉe punktoj aŭ ĉe demandsignoj. Eble la presita vorto havis tiom da valoro por ili ĝuste, ĉar ili ne komprenis, kion ili legis, kaj ne povis solvi la multnombrajn mensogojn de la cenzuritaj gazetoj. Sur la unua paĝo de ĉiu gazeto dum la milito staris en dikaj literoj: „La progresoj de niaj armeoj“, kaj ili supozis ke tio estas la tuta enhavo de la gazeto. Kun tia kredo ili vivis ĝis ili ekaŭdis de hejmenvenintaj vunditoj kaj kripluloj tekston iom diferencajn rilate al la rubrikoj en la gazetoj.

Krom tiuj silabadlecionoj, la instruistoj donis al la loĝantaro instruon je imperiestropsalmoj kaj imperiestrohimnoj. La scioj de la popolo pri matematiko kaj geografio estis iometaj, preskaŭ reniaj. La bedaŭrinda instruisto mem ne sciis multe sed sentis, ke estas io erra, kaj interna revoltemo plenigis lin per malamo kontraŭ ĉio, kio estis supera klaso kaj altrangaj oficistoj. La so-

la ekstera signo, kiun li kuraĝis montri pri sia digno, estis ne uzi amelitan kolomon kaj kravaton; kaj la malrigida, plej ofte kolora ĉemizo, ligita ĉe la kolo per malgranda ruĝa rubando, estis la konigilo de la t'pa popollerneja instruisto. La tuta kapo estis kvazaŭ arbo. La longaj haroj pendis ĝis la vila barbo. Tiu senĝena aperado atestas lian malŝaton pri la estanta socia stato. Sed lia maldiligenta, sklava, malvigligita, subpremita kaj ofte alkoholdetruita animo ne kapablis klopodi por altigi ĉe si mem kaj ĉe la gejunularo la kulturon kaj pligrandigi la sciojn.

Estis io malserena kaj melankolia ĉe tiuj ĉi duonhomoj, kiuj malklare sentis, ke troviĝas kulturo, de kiu ili ne povas esperi ricevi parton, kaj kio dronis en la brandrivero kun emocia, tragike malĝoja kanto. Ĉiuj slavo estis ja tre muzikema, kaj la animstato de la popollerneja instruisto estas tre klare konebla en la melankoliaj kaj malgajaj kantoj, sen espero pri pliheligo, nur sklaveco, sklaveco kaj ankoraŭ sklaveco. Ili sciis, ke elparolita penso, deflankiganta de la regularo, signifas malliberejan punon, Siberion, minejojn.

La pastro, „popo“, la animflegisto, estis ankaŭ oficisto. Li konfesigu kaj ankoraŭ konfesigu, kaj liveru al la polica oficejo statistikon pri la nombro de la konfesoj. Se rusa regato, apartenanta al la rusa eklezio, kiu estis ja parto de la greka-ortodoksa eklezio, konfesas ĉe la popo kontraŭimperiestran penson aŭ faron, la devo de la popo estas raportiti al la sekreta polico. Por ĉiu ĝustkreda ruso la imperiestro estis ja la ĉefo de la eklezio kaj sur la tero reprezentanto de Dio. La popo ne provis eduki al klerigo. Instinkte li sentis, ke la potenco de la eklezio kaj de la ŝtato dependas de la blindeco de la popolo. Lia propra klero estis malla. ofte eĉ ne triaklasa lernejeduko, kaj la vivado en la vilaĝoj kune kun nur vilaĝanoj ne povis altigi lian kulturon.

En la hejmo de la popo kaj lia edzino estis drinkado kaj bonvivado. Baptoj, enterigoj kaj geedzigoj estis pagataj per produktoj, kaj estis ankaŭ malnova kutimo, ke la vilaĝano ĉiudimanche kunportu al la preĝejo ovojn, kokojn kaj multe pli, kion la edzino de la popo sciis ŝanĝi al mono.

Multo da amuzaj anekdotoj estus rakontebloj pri la malfideleco de la vilaĝa popo. Tamen li tre zorgis pri la kara sano de sia edzino, ĉar estis regulo en

la leĝo, ke, se, ŝi mortus pli frue ol li, li aŭ tuj reedziĝu aŭ fariĝu monaĥo, kaj la monaĥeja vivado ne logis gajulon, kiu vizitadis ĉiujn vilaĝajn festenojn.

Diservo okazis la dimanĉojn dum sonorilado, kaj kiam la popo malantaŭ la „ikonostaso“ plenumis la diservon, la paroĥanoj staris surgenu sur la preĝeja planko, ripetante dum multnombraj kru-csignoj: „Hospodi pomiluj“, Dio kompatu. Histeria plorado estis ofte aŭdata en la preĝejo dum la diservo, kaj ĉe enterigoj kaj eĉ ĉe geedziĝoj apartenis al la necesa ceremoniaro, ke virinoj ekhavis histerajn ekscitojn kaj kriis kaj jetis sin konvulsie sur la plankon.

Fine iom pri la ukraina vilaĝano en la sudruslandaj provincoj. Forta, altstatura, blonda kaj bluokula, lia aspekto ne estis malagrabla, sed pri la karaktero li estis multe malpli fidinda ol la grandruso, rusa kaj nesincera. Pli facile ol la grandruso li povis ŝajnigi respekton, estis preta kisi la plandon de la bienulo por malgranda favoro aŭ donaco, kiel hejt-ligno, pajlo, fojno aŭ io simila. Kaj maldiligenta li estis, maldiligenta kiel itala lazaroni! Kun la plej bona nigra tero, kiun Eŭropo posedas, li ne bezonis multe labori por konservi la argilan dome-ton kaj la vestaĵojn, konsistantajn el ĉemizo, pantalone el hejme-teksita tolo kaj ŝaffela pelto, kiam malvarmo okazas. La ŝaffela pelto de la vilaĝano estas dmanĉa kaj labortaga vestaĵo, vintra kaj somera mantelo, litkovrilo, littuko, kuseno, matraco, ĉio, neevitebla objekto, kiu turniĝas jen kun la haŭto, jen kun la haroj eksteren.

La riĉa vilaĝano, kiu posedas 10 ĝis 15 hektarojn da tero kaj multon da brutoj, loĝas egale primitive kiel la malriĉa, kiu posedas nur siajn kvar murojn kaj la tagsalajron. La ŝaffela pelto eble estas malpli multuzita, kaj la edzino havas pli multajn koralĉenojn ĉirkaŭ la kolo, sed cetere oni kompreneble dro-nigas la riĉecon en „vodko“, brando, la plej granda feliĉo de la vivo.

Estis tiuj ĉi sociaj klasoj kaj naciĉj, kiuj estis reprezentitaj en la urbdoma salono en Winn'ca la 10-an de februaro 1917, kiam grafo Dmitri Hejden sole-ne, sub la portreto de imperiestro Nikolao 2-a, malfermis la ziemstvo-kunsidon per la kutimaj vortoj: „En la nomo de la imperiestro“.

La kunsido daŭrus dek ĝis dek-du tagojn, dum kiu tempo la komunumaj bud-ĝetdandoj kaj aliaj aferoj de la guber-

nio estus decidota. La unua prepara pa-rolado ĵus finiĝis dum ia animstreĉo. Ĉiuj sentis en la aero, ke estas malbone kon-cerne al milito, ministra konsilantaro, dumo kaj imperiestra prestiĝo; sed ne-niu en la salono sciis, ke la imperie-stra aŭtoritato ŝanceliĝas en ĝuste sa-ma momento, kiam telegramo subite e-stis liverita al la prezidanto. La tele-gramo tekstis tre mallonge: „Prokrastu ĉiujn kunsidojn kaj oficialajn kunvenojn. Neniaj reguloj bezonas esti aplikataj. La dumo, Peterburgo“.

— — — — —
Tradukis John Lundgren.

SEKRETA AMO.

Fajra amo por virino
en animo mia bolas,
sed al ŝi pri mia amo
mi neniam ekparolas.

Mian grandan, junan amon
mi ĝis nun ne jam proklamis,
kvankam mi ŝin en sekreto
antaŭ longe jam ekamis.

Ofte al mi mem mi diris:
„Nu, kuraĝu, kamarado,
al ŝi diru vian amon.“
Sed en ŝia ĉeestado

mi ektremas kiel kano,
kiel senmalica knabo,
kaj el mia buŝ' eliras
unu sola ne silabo.

Stimulite per afabla
ŝia rido, mi en fino
tre mallaŭte nur murmuras:
„Bonan tagon, sinjorino.“

Jan van Schoor.

POLLANDA KRONIKO.

KRAKÓW. Sub alta protektorato de la hispana Ministro Francisko Serrat y Bonastra, urbprezidanto dro Kaplicki kaj dank' al iniciato de hispanaj Esperanti-staj Rondoĵoj en Madrido, Kataluna espe-ranta Federacio en Barcelona, Societo de Amikoj de la hispana kulturo sub nomo „Cervantes“ en Kraków kaj fer-vora laboro de nelacigeblaj pioniroj sur la kampo de propagandaj artismaj aran-ĝoj por esperanta movado f-ino N. Ber-tizanka kaj s-ro H. Schnitzer okazis la 9-an de majo k. j. en koncertsalonego „Sala Saska“ sukcesplena solena Hispa-

na Vespero. La programo konsistis el melodiplenaj popolkantoj hispanaj kaj katalunaj romancoj, serenadoj, kantitaj de artkantistinoj M. Fehérpataky kaj Elvira Czechówna. La lasta en belega originala kataluna kostumo. Deklamis hispanan en esperanto tradukitan baladon ĉarma artistino de la urba teatro s-ino M. Krzewska. La plenplena salonego unanime aplaŭdegis kun vera entuziasmo la belege aranĝitajn dancojn de baledlernejo de s-ino Vera Aniuta Wachsmann, precipe la plej malgrandan „Carmen“ de l' mondo. Mandolinista orkestro ludis komponaĵojn tipe hispanajn kaj la vesperon honoris solenaj paroladoj de prof. dro Bujwid kaj pastro prof. dro Kruszyński.

Dua hispana vespero okazis la 14-an de majo en Industria Muzeo, kie prelegis tre interese pastro dro Kruszyński pri „Batalo apud Lepanto“ kun lumbildoj pri la batalo kaj plej belaj vidindaĵoj de Hispanujo. Post la prelego sekvis artistaparto. La rolon de la Conférencière plenumis gaje kaj sprite nia konata verkistino Irena Szczepańska. Akompanis pian tre subtile s-ino prof. Róża Freundlichowa.

LWÓW. 4. V. okazis en X-a Stata knaba gimnazio prelego de s-ro Toczyski pri esperanto por skoltoj. Post la sukcesplena prelego komenciĝis kurso, kiun partoprenis 20 skoltoj. — 25. V. **Societo Esperanto** aranĝis gajan vesperon, kiel propagandan vesperon por-esperantan. — Invitvortojn al pleniganta tutan salonon publiko diris bele kaj fervorplene ĉiam vigla kaj por la movado konstante laboranta — **dro I. Fels.** Poste — sekvis numero post numero humorplena, gaja kaj bela. — La ĉeestantaro forte aplaŭdis ĉarman, junan kantistinon **Gina Zuckerman**, kiu per simpatia voĉo, kaj dolca rideto venkis tuj ĉies korojn. **Speciale** plaĉis kantita en esperanto „La lasta dimanĉo“ — populara, sentema tango, en traduko de s-ro Toczyski. — Ankaŭ kantitaj en pola lingvo kantoj de s-ro **P. Juweles** — elvokis longedaŭran aplaŭdon. — Mallonga scenafeto de s-ro Toczyski „Gramatyka esperanca“ ludita de unaj, 10-jaraĝaj lernantinoj de f-ino **S. Steiger**, estis vera plaĉaĵo, kaj la senlaca instruistino meritas pro sia laboro plenan estimon.

Programon plenigis originalaj kantetoj de s-ro mgr. **B. Berger** kaj **W. Immer-**

daŭer, al kiuj ĉi-lastaj ankaŭ skribis melodiojn.

Kiel ludantoj — krom ĉarma f-ino **G. Zuckerman** kaj s-ro **Juweles** — estis aplaŭdataj: f-ino **Jurgesówna**, mgr. **Herr N.**, kaj aliaj. — Reĝisoro — kaj sendube plej perfekta aktoro — estis senlance de longa tempo por Societo laboranta s-ro **Maurycy Altstock**, al kiu s-ro **Berger** post la prezentado, varm-vorte esprimis ĝeneralan dankemon. La ĉeestantaro hejmeniris ridetanta kaj kontenta — vere konvinkita, pri la profunda senco de refreno en finkanto „Uczmy się esperanta“.

WARSAWA. „Konkordo“ apartenas laste en Varsovio al la plej agemaj societoj e-aj. Krom la regulaj deferoj, krom la kunvenoj, okazas ofte, sisteme prelegoj laŭ plej diversaj temoj. La 1-an de aprilo okazis prelego je temo nuntempe tre aktuala: **Harandismo kaj Esperanto.** La prelegantino, f-ino **Halina Cukierman** — unu el la plej fervoraj pioniroj de l' Haranda movado en Varsovio — donis al ni belegan lecionon pri la vivo, agado de **Ireno Harand** kaj pri la signifo de ŝia movado por la kulturo.

En la nuntempa Eŭropo, kiam la plej multaj ŝtatoj celas al diktatoreco, kaj ne ĉiuj landoj celas egalsisteme, indas esplori kaj analizi, kiuj el ili estas pli kaj kiuj malpli etikaj, kiuj — subtenindaj kaj kiuj kontraŭbatalindaj. **Ireno Harand** el Vieno venis al la konkludo ke la plej kontraŭbatalinda estas la — **Hitlera sistemo.** Kaj al tiu konkludo venis nek ia socialisto, aŭ komunisto, nek liberpensulo. Guste pro sia plena sindono al la Kristanismo, s-ino **Harand** „kontraŭbatalas la Antisemitismon pro tio, ke ĝi malhonorigas la Kristanisman“... Kaj, transdoninte al ni tre multajn detalojn pri la vivo, eduko de **Harand**, kiel ŝi — iama centprocenta antisemitino — iom post iom transiradis en la malan pozicion, kiel ŝi — sur bazo de plej famaj scienculoj — pravas pri malutileco de raspureco, pri supereco de ras-intermiksiĝoj, kaj tre tre multajn interesajn sciindaĵojn (bedaŭrinde mankas loko por pli detale pri tio skribi) la prelegantino belege evidencigis la komunajn trajtojn de **Harandismo** kun la **Esperantismo ĝenerale**, kaj **KONKORDismo speciale.** (**N. B.** La Haranda movado subtenas E-on kaj ofte aperigas artikolojn en sia organo **GE-RECHTIGKEIT-IUSTECO**).

La aŭskultantoj per longdaŭraj aplaŭdoj pruvis sian kontentecon kaj la poste formiĝinta diskutado daŭris pli ol horon, kio ankaŭ povas pruvi pri la grado de la interesiĝo.

Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo — „STEP” — aranĝas ĉiujaŭde kluba'n vesperojn, dum kiuj okazas diversaj prelegoj: la 7-an de majo dr. Adam Zamenhof prezentis tre belan kaj interesan filmon el sia vojaĝo al Romo kaj Afriko en 1936, la 14-an de majo s-ano Eug. Rytenberg prelegis je temo: „En la lando de mallumo”.

Dejoroj de STEP okazas jaŭde, h. 20—20.30 en ejo de Kuracista Asocio, ĉe str. Królewska 23. Adreso por korespondadoj: Warszawa, str. Leszno 99, m. 5.

En Warszawa okazas nun 3 kursoj de Esp. por blinduloj: 1 elementa en la **Stata Blindulinstituto**, gvidata de s-ro Rokicki, kaj 2 superaj, gvid. de s-roj Wrzesiński kaj Rytenberg. La preparaj laboroj sub direkto de kpt. Jan Silhan al **Universala Kongreso de UABO** en Warszawa 1937 marŝas bonege; estas promesita helpo morala k. financa de gravaj institucioj.

VIENA VESPERO EN WARSZAWA.

Okaze de la 28-a **Universala Kongreso de Esperanto en Vieno** **Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo** aranĝis la 24. 4. 36 en **Filharmonio** en salono de „Lutnia” grandskalan **Aŭstrian Vesperon** sub la **Alta Protektorato** de s-ro Maximilian Ritter von Hoffinger, **Ministro de Aŭstrio**.

Ĉeestis **Ministro Ritter von Hoffinger**, legacia **Konsilanto Feliks von Strautz**, **Konsilanto Rebczyński**, familio **Zamenhof**, multaj reprezentantoj de la aŭstria kolonio, de pola socio kaj amaso da esperantistoj.

La **Vesperon** malfermis **prezidanto de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo**, **Konsilanto Wyszynski**, kiu salutinte la ĉeestantaron, klarigis, ke la **Vespero** estas aranĝita okaze de la 28-a **Universala Kongreso de Esperanto en Vieno**, kie jam post kelkaj monatoj estos akceptataj esperantistoj el la tuta mondo. **Dezirinte al Viena Kongreso plenan sukceson** kaj alvokinte al multnombra partopreno en la **Dudekoka**, li transdonis la parolon al s-ro **Ministro von Hoffinger**.

La **Ministro** kore salutis ĉiujn kaj en varmaj vortoj invitis la publikon parto-

preni la kongreson kaj viziti Vienon.

Tre interese parolis dr. **Róbin**, unu el la plej malnovaj esperantistoj kaj kunlaborintoj de dr. **L. Zamenhof**. Li priparolis la signifon de unu komuna lingvo kaj la rolon, kiun ekludis poloj en alproksimiĝo de popoloj pere de Esperanto. Li skizis la silueton de dr. **L. Zamenhof**, lian karakteron kaj modestecon, kaj lian noblan faron, ke li rezignis pri ĉiu rajtoj koncerne sian grandan verkon kaj donis ĝin al la tuta homaro.

Belege prelegis je temo „**Esperanto kaj la revo**” famkonata kaj tre ŝatata samideano **Leo Belmont**. Li rememoris la historiajn momentojn pri **Aŭstrio kaj Vieno**, rakontis pri travivaĵoj de turistoj, vizitantoj tiun ĉi belan landon, — kaj poste transiris en la spiritan mondon de dr. **L. L. Zamenhof**, en mondon de **Liaj revoj**.

La publiko forte aplaŭdis la belegan prelegon de la orbuŝa oratoro.

Grandan intereson vekis la filmo „**Ekskurso tra Aŭstrio**”, speciale venigita el **Vieno**.

En riĉa koncerta parto partoprenis s-ino **Berta Jarecka**, (kanto), s-ino **Janina Skomorowska** (violonludo), s-ino **Bronisława Aronowicz** (deklamo) kaj baleta grupo de s-ino **Tacjana Wysocka**.

Negranda sed bela turisma ekspozicio de broŝuroj, prospektoj kaj murafiŝoj pri **Aŭstrio** plaĉis al la publiko.

La **Vesperon**, kies celo estis propagando por la 28-a **Universala Kongreso de Esperanto en Vieno**, ĉeestis pli ol 250 personoj.

Halina Weinstein.

Varsovio, en majo 1936.

LUDMILA JEVSEJEVA.

VENU, KARA!

Venu, kara! Ni estu feliĉaj sen fin',
Ĝis la fundo ni trinku pokalon de l' ĝojoj!
Nur kun vi, mia sole amata knabin',
Paŝos mi sur la dornplenkovrita vivvojoj!

Venu, kara! Forgesu en mia brakum'
Pri aŭtuno pluvriĉa, raŭke tusa kaj ftiza.
Al ĉielo nin portos de l' sentoj samum',
For de l' mondo banala, skeptika kaj griza.

Venu, kara! Firmligos nin korharmonij'
En haoso senluma de l' tempo nervoza,
Dume vivo la sulkojn ne plugis al ni
En la frunton, per mano malpura kaj proza.

RECENZOJ.

L. SINHA: Hindo rigardas Svedlandon. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm 1. 200 paĝ. Prezo: broŝ. 3,75, bind. 5,— sved. kr.

Dum la lastaj jaroj oni renkontis en la esperanta gazetaro ofte la nomon de Lakshmiswar Sinha. Plej ofte la kronikoj rakontis pri liaj sukcesaj prelegoj en Svedlando, sed li vizitis ankaŭ aliajn eŭropajn landojn, eĉ Islandon kaj la Feroajn Insulojn.

S-ro Sinha antaŭ kelkaj jaroj venis Svedlandon por tie studi svedan slojdon. Hazarde li konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin. Per tio li ricevis multajn amikojn sveda'n, kaj oni petis lin fari antaŭ esperanta publiko prelegojn pri sia interesplena hejmlando. Tion li ankaŭ faris, kaj la famo de la nova hinda samideano disvastiĝis rapide tra la lando. La sekretario de la landa asocio organizis prelegvojaĝojn, kaj s-ro Sinha kelkfoje traveturis kiel prelegisto la vastan landon.

Post kelktempa restado en sia hejmlando li denove venis Svedlandon, kie li estis plej kore salutata de la esperantistoj. Kvankam li volis sin dediĉi nur al studoj pri la lando kaj precipe ĝia slojdo, li devis denove fari prelegvojaĝojn. Antaŭ sia reveturo al la hejmlando en la malproksima oriento li volis esprimi sian simpatian al Svedlando kaj ĝia popolo. Pro tio li nun verkis libron, kiu ricevis la titolon „Hindo rigardas Svedlandon“. La aŭtoro montras en ĝi, ke li tre bone konas la landon kaj ĝian popolon. Li vizitis ĉiujn provincojn kaj kun granda amo li priskribas ilian variantan naturbelecon kiel ankaŭ la amindajn ecojn de la popolo. Post nelonga enkonduka ĉapitro kun ĝeneralaj informoj pri Svedlando kaj ĝia ekonomia vivo sekvas ĉapitroj pri Stockholm kaj lokoj ĉirkaŭ la lago Mälaren, Gotlando — la estinta reĝino de Balta Maro, Dalarna — la koro de Svedlando, Vermland — la lando de Gösta Berling, Smaland kun la urbo de alumetoj k. t. p. Li priskribas vizitojn ĉe fiŝistoj kaj ĉe laponoj, plej nordaj loĝantoj de la lando. En du tre interesaj ĉapitroj la aŭtoro vigle priskribas la svedan slojdon kaj svedajn morojn kaj kutimojn, kiujn li trovis rimarkindaj.

Antaŭparolon verkis la profesoro ĉe la Universitato en Uppsala Björn Colinder.

La interesan kaj je faktoj tre riĉan libron plibeligas ne malpli ol 128 bildoj.

La libro de Sinha sendube kaptos la intereson de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Estas maloftaĵo, ke briĉano tiel serioze studas la naturon kaj kulturan vivon de okcidenta lando, ke li poste kapablas verki riĉenhavan libron pri la temo, kaj en la historio de la esperanta literaturo tio estas ĝis nun unikaĵo.

Katalogon pri originalaj aŭ tradukitaj verkoj en Esperanto eldonis El. Soc. Esperanto, Stockholm 1. Inter la plej gravaj verkoj en la katalogo estas Sveda Antologio, Gösta Berling (de Selma Lagerlöf), la nova libro pri Svedlando verkita de Lakshmiswar Sinha, k. c. La katalogo estas ricevebla rakte de la eldonejo aŭ el la ĉefaj esperantolibrejoj en diversaj landoj.

En majo aperis tradukita de B. Strelczyk libro de W. Sieroszewski s. t. *Marŝalo Józef Piłsudski* eldonita de Związek Ociemniałych Żołnierzy R. P. (Unuiĝo de Polaj Militblinduloj) en brajla sistemo. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 130 paĝojn kaj estis presita en Stockholm.

TURISTAJ PROPAGANDFOLIOJ KAJ PROPAGANDILOJ.

Lastatempe nia Redakcio ricevis kelkajn, el kiuj ni mencias:

Berno - Svislando, eldonita de la trafikanta Kontoro de la Urbo Berno.

Bona okazo por travojaĝi Svisujon kaj viziti belege situitan ĉefurbon de Svisujo estos por multaj Esperantistoj la venonta Universala Kongreso en Vieno. Oni povos viziti ne nur treege pitoreskajn ĉirkaŭaĵojn de Svisujo, sed mirindajn muzeojn, bibliotekojn, bernan lernejan ekspozicion (Instituto por modernaj problemoj pri edukado kaj instruado). Gvidfolio, belege eldonita, estas ricevebla senpage: Bundesgasse 18, Berno Svislando.

Programo por la Aŭstria Brucknerfest. Linz ĉe D. St. Florian, Steyr la 18—22 de julio 1936 kun 20 belegaj vidindaĵoj el Supra Aŭstrio. Eldonita de Oberösterreichisches Landes Verkehrsamt, Linz ĉe D. Biletoj por koncerto por 6 prezentadoj 10—2 ŝilingoj.

Actividades Turísticas en Rio de Janeiro eldonita angla— kaj hispana—lingve. En la teksto Esperanto pri ekspozicio internacia.

Belaj vidaĵoj de la ĉirkaŭaĵoj de Rio de Janeiro, la plej bela urbo de la mondo, belegaj marbanoj sur la bordo de Oceano Atlantika Ipanemo, Copacabana, Brazila Karnavalo k. t. p.

XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. (12-15) AŬGUSTO.



Wien, 8—15 de aŭgusto 1936.

Komuniko Nr. .

Kotizo ĝis 30 de junio: sv. fr. 25.50,
por familianoj 16.—, por gejunuloj mal-
pli ol 18-jaraj 10.80.

Detalojn pri karavano legu en Nro 4.
de „Pola Esper.“.

Programon legu en No 5. de „Pola
Esper.“

Detalojn pri programo de la Kongreso
kaj ekskurso „Tra Aŭstrio“ petu de P.
E. D., Kraków, Lubicz 34. kaj por Var-
sovio de H. Weinsteinówna, Warszawa,
Leszno 99. m. 5. Nepre aldonu pmarkon
por respondo.

Ni atentigas, ke la nombro de parto-
prenontoj estos limigota.

Ĉe demandoj aldonu pmarkon por re-
spondo.

Ludwik Kutscher

Ekzekutiva ano de P.E.D.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

„Sennomulo esperanta“. Ne konante
vian adreson, ni povas nur prese respon-
di. La ideo, de vi prezentita, ne estas
nova. En ĉiu propagandilo pri Esp. tro-
veblas argumento, ke per eldonado de scien-
caj verkoj en Esp. oni multe plifacili-
gus ~~div~~ vastiĝadon de scienco kaj ankaŭ
de Esp. mem. Temas „nur“ pri monri-
medoj, kaj tiun problemon ankaŭ vi ne
solvas kontentige, kredante tro facile, ke
eble troviĝos multaj samideanoj, kiuj vo-
lonte prirezignos monsumojn, elspezotojn
dum la univ. kongreso, kaj partoprenon
en ĝi, por anstataŭe eldonigi sciencajn
verkojn. Se estus tiel, oni ekz. ne aran-
ĝadus „balojn ie senlaboruloj“ aŭ „...je
orfoj“, sed la monon dum balo elspezot-
tan oni simple oferus al ili sen ripokri-
teco, ke oni estas bonfarema. La homoj
estas ĝuemaj kaj multe da ili pli facile
fordrinkos 50 zł, ol oferos al malfeliĉulo
50 gr.

S-o E. M. Szcz. La artikolo „Kie dan-
ĝero?“ estas multe tro longa. Cetere la
temo estas jam tiomfoje draŝita, ke ĝi
jam naŭzas nervozajn samideanojn. Ni tre
petas vian kunlaboron, sed la artikoloj
estu skribitaj koncize, interese, ne ba-
bilule.

Al ĉiuj kunlaborantoj. Insiste ni petas
skribi tre legeble, ĉar nia kompostisto ne
konas Esp-on. Bv. memori, ke provizado
de koncernaj literoj per supersignoj a-
partenas ankaŭ al verkanto de artikolo
kaj ne al redaktanto. Sendube en diver-
saj raporto aŭ kronikaĵoj treege „gra-
va“ estas por kelkaj la fakto, ke la pre-
zidanto „ekstaris“ aŭ „sidiĝis“, ke la se-
kretario „per forta voĉo eklegis“, aŭ ke
plua rolanto estis „nia konata x“, aŭ „nia
fervora kaj belvizaĝa y“ aŭ nur „nia“,
sed tiuj „gravaj“ faktoj de ekstaro aŭ
sidiĝo, valoraj kaj valorigaj epitetoj sen-
bezone rabas lokon en P. E. kaj pacien-
con de modestaj samideanoj, kiuj ne fla-
tas kaj ne volas esti flatataj. Bv. nin sci-
igi pri ĉiu fakto en nia asocia kaj Esp-
ista vivo, sed ne troigu kaj ne parolu
tro multe. Cetere bv. memori, ke mate-
rialon por plej proksima n-ro de P. E.
ni akceptas nur ĝis 20-a tago de antaŭa
monato kaj ni neniel povus plenumi pre-
tendojn de iu, sendinta materialon la 29-
an, ke ĝi aperu en la plej proksima n-ro,
ĉar tiam la n-ro estis jam preta por ek-
spedo. Nunmonate la n-ro speciale mal-
fruiĝis por enpresigi raporton pri la kon-
greso.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie
zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. ro-
cznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer
pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony
zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja:
małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.600.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por
societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł.
6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero
zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.—
1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto
de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—